

Tiel ni markas la 75an naskiĝjaron de Svisa Esperanto-Societo, parto 3a
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 754, 1978.03.22 & 24 & 25

CL.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Dum prelegaro ni prezentas al vi historieton de la Esperanto-movado en Svislando helpe de tekstoj, kiujn ni ĉerpas el la revuo Svisa Espero. Tiel ni markas la 75-an naskiĝdaton de Svisa Esperanto-Societo.

A.- En julio 1905 Théophile Renard, la redaktoro de Svisa Espero, konkludis artikolon pri la okazonta Bulonja Kongreso, per paroloj de la poeto Goethe:

CL.- «Von hier und heute geht eine neue Epoche in der Weltgeschichte aus, und können sagen, Ihr seid dabei gewesen.» (El ĉi tie kaj hodiaŭ komenciĝas nova epoko en la mond-historio, kaj vi povos diri, ke vi tie ĉeestis.)

A.- Théophile Renard, kiel pluraj aktivaj svisaj esperantistoj, bone konsciis pri la graveco de la Bulonja Kongreso. Li certe ne malpravis. En septembro 1905 Svisa Espero estis nature komplete dediĉita al la Bulonja Kongreso. Kio mirigas nin, tio estas la nombro de la nacilingvaj paĝoj kompare al la loketo rezervita al Esperanto mem. Unue tripaĝa raporto germanlingva verkita de Friedrich Schneeberger, prezidanto de Svisa Esperanto-Societo, raportas pri la oficialaj okazintaĵoj. Sekvas la teksto de lia tosto en la festeno, tio en Esperanto. Poste venas tre interesa 7-paĝa raporto franclingva, kiun verkis Henri Ströle, astronomo en Neuchâtel. Tiu teksto bone respegulas la entuziasman etoson, kiu karakterizis la Bulonjan Kongreson.

CL.- Fine alvenas rubriko en Esperanto titolita Svisa Kroniko. En ĝi troviĝas teksto, kiu povas vin interesi. Ni citas : «D-ro Zamenhof tra Svisujo. Revenante el la Boulogne-a kongreso, la aŭtoro de Esperanto kaj lia edzino rapide traveturis nian landon.

A.- La 14-an de aŭgusto je la oka horo vespere, li alvenis en Ĝenevo, en kies stacidomo li estis ricevata de samideanoj, bedaŭrinde nemultaj, ĉar lian alvenon oni sciis nur antaŭ kelkaj horoj. F-inoj Borel kaj Délétra, S-roj Mallet, Edouard kaj Emile Bernard, Dubois, patro kaj filo, kaj Renard tre certe, memoros ĉiam la agrablajn momentojn, kiujn ili pasigis kun D-ro Zamenhof kaj lia afabla edzino.

CL.- Ili povis ŝati plene la trankvilan modestecon, la simplecon de l'genia elpensinto de Esperanto. Oni komprenas, ke nura amo por la homoj estas en li tiel potenca forto, ke li povis, malgraŭ la sennombraj malfacilaĵoj daŭrigi la batalon por la kara ideo kiu turmentas lin de l'infaneco.

A.- Niaj gemastroj, post la lacigaj kongresaj tagoj bezonis ripozon; tial la gastamo kiun ili bonvolis akcepti ĉe la Sekretario de l'Svisa Esperanto-Societo - estis sinjoro Théophile Renard - estis tute senbrua, simpla, hejmeca kiel eble.

CL.- La morgaŭan tagon, dum belega vetero, ili foriris ŝipe sur la Lemana Lago, kun la Redaktoro de Svisa Espero (ĉiam sinjoro Théophile Renard). En Nyon, s-roj Ferrari, kaj Fleur-de-Lys venis havenen, por saluti entuziasme nian majstron; en Nyon ankaŭ supreniris sur la ŝipon s-inoj Schenk el Rolle, informitaj telegrafie. Ni babiladis dolĉe ĝis Ouchy, montrante ĉu la lokojn de niaj esperantistaj kunvenoj de Coppet aŭ Rolle, ĉu la belaĵojn de l'pejzaĝo.

A.- Post la tagmanĝo en Ouchy, sur la laga bordo, ni devis forlasi Gesinjorojn Zamenhof en la stacidomo de Lausanne, ili forveturis tra Bern, kie S-roj Schneeberger, nia prezidanto, Feierabend, nia kasisto, kaj Hasse salutis ilin. S-ro Schneeberger akompanis ilin ĝis Thun, poste niaj karaj gemastroj veturis tra Interlaken, Luzern, Zürich, Buchs, Wien, por trovi hejme en malproksima Rusujo meritatan ripozon, kronitan per glora memoro de l'Boulogne-aj festoj.» Fino de la citaĵo.

Cl.- Aŭdante tiun raporton vi certe bedaŭris, ke ĝia aŭtoro, s-ro Théophile Renard, nenion diris pri la pritrakitaj diskuttemoj. Persone, ni estas preskaŭ certaj, ke Zamenhof kaj Théophile Renard interŝanĝis siajn vidpunktojn pri la dua kongreso okazonta en Ĝenevo kaj ĉefe pri la grava dogmaro, kiun Zamenhof defendis sub la nomo hilelismo aŭ homaranismo. Tiurilate en la sekva numero de Svisa Espero, decembro 1905, ni povas legi tiun ĉi paragrafon, kiun Théophile Renard mem verkis:

A.- «Private ni aŭdis, ke D-ro Zamenhof ne sole venos al la kongreso, sed proponos tie tre gravan aferon, pri kiu li revis en la daŭro de tre multaj jaroj kaj kiu, malgraŭ sia granda graveco, elvokos tamen nenian disputadon, ĉar ĝi konsistos nur en la kreado de aparta sekcio, al kiu ĉiu esperantisto povos aliĝi aŭ ne aliĝi laŭ sia propra bontrovo.»

Cl.- Per letero, kiun Edmond Privat ricevis en Boulogne-sur-Mer, kaj kiun la organo Revue Neuchâteloise publikigis en 1968, oni nun scias, ke la filozofo Ernest Naville, kiu loĝis en la ĝeneva kamparo, invitis D-ron Zamenhof. Aŭdu eron el tiu letero:

A.- «Se d-ro Zamenhof traveturos Ĝenevon ĉirkaŭ la 15-a de aŭgusto, mi opinias, ke vi kunestos. Mi petas vin, se tio estas ebla, instigi la doktoron veni min vidi, kvankam mi estas nura simpla aprobanto. Vi proponos al li lin akompani, kaj en 'Chalet de Grange Gaby' (tio estas la nomo de la domo de Ernest Naville) li trovos ne bankedon kun 200 sidlokoj, sed du lokojn ĉe nia familia tablo: unu por li, la alian por vi, tio je tagmezo kaj duono.» - fino de la citaĵo.

Cl.- Laŭ la raporto en Svisa Espero, ŝajnas, ke Edmond Privat ne estis en Ĝenevo, kaj Zamenhof ne vizitis la faman ĝenevan filozofon Ernest Naville.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!